

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1993:1

Rozoj

por La Espero
80-jara en 1993



La Espero

Organ för
Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Februaro 1993 • 81-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktör: Per Aarne Fritzon,
Västertorpsvägen 154,
126 59 Hägersten,
tel. 08-97 47 76

Frågor om prenumeration o.dyl.:
Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21,
111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvarelig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: Quintus, Sollentuna 1993

Prenumeration: 145 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 75 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

Esperantoförbundet

Adress: Esperanto-Centro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08-11 74 34, fax: 08-20 72 20

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11-13 och 17.30-19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1993:
Direktansluten medlem 145 kr.
Famijemedlem (utan tidning) 60 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr.
Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till Esperanto-Centro.

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B,
Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september-15 maj: torsdagar kl. 17-18. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,
Storgatan 13, 753 31 Uppsala



Redaktanto:

En 1979 mi fariĝis redaktanto de *ktp*, la revueto de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU). Post kelkaj jaroj mi lasis *ktp*-n por *Kontakto*, la revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Ĝin mi redaktis ĝis 1989, kiam mi komencis redakti *La Esperon*.

Post dekkvarjara redaktado mi iel sentas, ke mi bezonas paŭzon. Ne mankas al mi ideoj, sed kiel patro de tri infanetoj – Nils havas tri jarojn, Petter du, kaj Karl naskiĝis ĉi-jare – mi volas rezervi pli da tempo por ili, kaj iom malpli por esperanto, dum kelkaj jaroj.

Transprenos la ĉefredaktadon Per Aarne Fritzon. Tio estas bona elekto, ĉar Per Aarne jam dum la pasintaj jaroj faris grandan laboron pri *La Espero*. En la redakcio kunlaboros ankaŭ Kaisa Hansen kaj mi, ĉar kvankam mi ne volas esti ĉefredaktanto kaj respondeculo, mi volonte

alportos mian brikon. (Tio cetere estas la esperanta traduko de "dra sitt strå till stacken", laŭ nia nova vortaro.) Mi estonte respondecos nur pri librocenzoj kaj pri la rubriko "Temo".

La Espero kaj la legantoj

Vi, t.e. la legantoj, estas bonaj kunlaborantoj de la revuo. Kiel redaktanto mi rege ricevis multe da materialo por la revuo. Tio estas bonega! Vi daŭre sendu raportojn, artikolojn, *ktp*. Nur ne ofendiĝu, se la redaktanto iam devas mallongi, aŭ iam eĉ tute ne aperigi iun informon. Tio estas necesa. Por ke revuo fariĝu bona, la redaktanto devas havi eblecon elekti.

Mi deziras al Per Aarne ĉion bonan pri lia estonta ĉefredaktado.

Sincere via
Leif Nordenstorm

Ny adress/Nova adreso

Använd nedanstående adress för material till *La Espero*.

Per Aarne Fritzon
Västertorpsvägen 154
S-126 59 Hägersten
tel: 08/97 47 76

Sendante materialon por *La Espero*, b.v. uzi la supran adreson.

Många höjda priser och avgifter

Valutamarknaden är ju som bekant orolig i dessa dagar och detta har påverkat många av de priser som annonserades i förra numret av *La Espero*. Du som

ännu inte betalat UEA-avgift, prenumererat på utländska tidningar eller anmält dig till världskongressen – observera de nya priser som publiceras i detta nummer!

SEF:s styrelse

Ordförande: Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Handen,
tel. 08-777 41 75

Vice ordförande: Kaisa Hansen, Hammarbyvägen 56, 194 36 Upplands Väsby,
tel. 08-590 882 10

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
tel. 08-712 82 91

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde,
tel. 0500-41 22 05

Styrelseledamot: Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby,
tel. 0415-501 52

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping,
tel. 011-17 36 87

Styrelseledamot: Per Aarne Fritzon, Västertorpsvägen 154, 126 59 Hägersten,
tel. 08-97 47 76

Suppleant: Leif Nordenstorm, Björknäsvägen 3 C, 961 34 Boden,
tel. 0921-123 54

Suppleant: Agneta Emmanuelsson, Carl Ugglas väg 6, 641 37 Katrineholm,
tel. 0150-523 87

Upsalo estos la kongresurbo

La Sveda Esperanto-Federacio invitas la esperantistojn al Upsalo por la jara kongreso de 1993. La kongreso okazos dum la pentekosta festo inter la 29-a kaj la 31-a de majo.

La kongresejo estos *Värmlands nation* (la domo de la vermlandana studenta korporacio), konstruaĵo tre bela (arkitekto: Ragnar Östberg) kaj tre bele situanta tute centre en la urbo, apud la katedralo kaj la jura fakultato de la universitato, kaj iom sub la teologia fakultato kaj la preĝejo *Trefaldighetskyrkan*.

Pri Upsalo

Upsalo estas la kvara urbo de Svedio laŭ grandeco, sed multilate konservis sian klasikan karakteron de urbeto. Tute mankas vitraj nubskrapuloj. La plej alta konstruaĵo estas la katedralo, kaj alia konata profilo estas tiu de la kastelo sur la upsala firsto, en kies regna salonego la reĝino Kristina abdikis en la jaro 1654.

Tra Upsalo fluas la rivero *Fyris*, dividante la urbon en du partojn: la orientata tradicie estas tiu de komerco, la okcidenta same tradicie tiu de la eklezio kaj la universitato.

La universitato estis fondita en 1477, kiel la unua en norda Eŭropo. Ĝiaj plej famaj profesoroj estis Lineo kaj Celsius. la dua universitato de Svedio estis tiu de Dorpat/Tartu, kaj la urbo Tartu nun estas ĝemeligita al Upsalo. Por esperantistoj menciindas, ke la ĉefa universitata domo estis inaŭgurita en... 1887.

Inter la muzeoj vidindas *Upplandsmuseet* (regiona muzeo), *Konstmuseet* (arta muzeo), *Bror Hjorts Hus* (iama ateliero de la pentristo kaj skulptisto Bror Hjorth 1894–1968), *Walmstedtska Gården* (konservita profesora hejmo el la 19-a jarcento), *Linnémuseet* (muzeo pri Lineo) kaj

Linnés Hammarby (la somera domo de Lineo, iom ekster la urbo).

La Esperanto-Societo de Uppsala estis fondita jam en 1891 kun la nomo Klubo Esperantista en Uppsala. Ĝi estis la unua Esperanto-societo en Svedio kaj la dua en la mondo, post nur tiu en Nurenbergo, kiu estis fondita en 1888. (Legu pli



en la libro *La Esperanto-movado en Uppsala* [1981], de Karl Söderberg.)

En sia kantokolekto *Gluntarne*, Gunnar Wennerberg (1817–1901) prikantis la urbon tiele:

*Parolas ci ĉevale
plejbonas ja upsale
el ĉiu lok' ĉi-flanke de la sun' trovebla,
kaj urb' kun sama ravkapablo
ne ekzistas, je diablo,
se serĉus ci eĉ ekde ekvatoro ĝis poluso...*

Ĉu liaj vortoj ankoraŭ validas? Ci devas mem esplori.

Pri la programo

La programo enhavos erojn kaj kulturajn kaj komunikajn. Esperanto ja estas kaj portanto de kulturo kaj ilo por interkompreniĝo. Ni invitis la faman polan aktoron **Jerzy Fornal**, kiu dum multaj jaroj estis ĉe la Pola Nacia Teatro.

Pri la teatra arto en Esperantujo, kiu havas surprize riĉan historion, prelegos

Zofia Banet-Fornalowa. Tiel ŝi ankaŭ donos al ni enkondukon al la teatraĵoj de Jerzy.

Hans Erasmus, juristo kaj gvidanto de projektoj ĉe la Eŭropa Komunumo, venos por prezenti al ni siajn spertojn pri la lingvaj problemoj de EK. Kiel problemsolvisto en la mediprotekta kampo, li analizas proble

blemojn kaj instigas al solvoj. Tiajn spertojn li povas apliki al ankaŭ lingvaj kaj ĝenerale komunikaj kaj kulturaj problemoj. Ni esperas, ke lia prezento instigos la kongresanojn al diskuto.

Mikaelo Bronštejn, el Tiĥvin apud Peterburgo, kantos por ni – humure kaj engaĝite! Profesie li estas inĝeniero pri elektro.

Ni ankaŭ invitis reprezentantojn de la Esperanto-movado en Tartu (la ĝe-

melurbo de Upsalo) partopreni en nia kongreso.

Krome la programo de la kongreso enhavos ankaŭ la devigajn punktojn, t.e. la kunsidojn de SEF kaj aliaj organizoj. Ni deziras al ĉiuj fruktodonan laboron.

Kiel atingi la kongresejon?

Se vi navigas laŭ *PIV*, atentu, ke tiu fama vortaro ne estas tute fidinda, ĉar la geografiaj koordinatoj tie donitaj estas pli proksimaj al tiuj de Malnova Upsalo, kiu estas multe pli aĝa ol Esperanto, sed nuntempe nur antaŭurbo situanta kelkajn kilometrojn norde de la nuna urbo. (Por daŭre posedi havenon, oni ja devis movi la tutan urbon pro la postglaciepoka teraltiĝo.) Sed Upsalo estas senpive trovebla: ĝi situas 66 kilometrojn norde de Stokholmo, el kiu veturas multaj trajnoj. Se vi venos el la nordo, vi eltrajniĝu proksimume 45 minutojn antaŭ ol vi atingos Stokholmon.

KONGRESAJ KOTIZOJ KAJ PREZOJ

Kongreskotizoj	Prezo	Kodo
Pago ĝis la 30-a de marto	200:–	A
Pago post la 30-a de marto	250:–	B
SEJU-membroj ĝis la 30-a de marto	100:–	C
SEJU-membro post la 30-a de marto	150:–	Ĉ
Kongresaj pakajoj:		
Manĝoj kaj litoj en modernaj kampadaj dometoj (Ne inkluzivas matenmanĝojn)	850:–	D
Unulita ĉambro en hotelo Svava + matenmanĝoj	1450:–	E
Dulita ĉambro + matenmanĝoj (por unu persono)	1100:–	F
Apartaj prezoj		
Lito en moderna kampadeja dometo/nokto	150:–	G
Surplanka dormado (por gejunuloj!)	Senkosta!	Ĝ
Unulita ĉambro en hotelo Svava/nokto	450:–	H
Dulita ĉambro en hotelo Svava/nokto/persono	275:–	Ĥ
Manĝo dum la tuta kongreso (ne matenmanĝoj) (indiku aparte, se vi deziras vegetaran manĝon)	550:–	I
Kongresaj glumarkoj (inkl. sendkosto)		
10 markoj	15:–	J
20 markoj	25:–	Ĵ
30 markoj	35:–	K

Pagu al pĝ 481 43 95 - 2, SEF-jarkongreso, indikante la kodojn de la pagataj eroj.

Adreso de la kasisto:

Tomas Jansson, Storgatan 13, 753 31 Uppsala, tel: 018/12 73 79.

Pri loĝado

Modernaj dometoj kun duŝo, necesejo kaj kuirforno, kvar- aŭ kvinlitaj, estos je dispono de la kongresanoj. (Ĉiu devas kunporti proprajn litotukojn kaj viŝtukojn.) Prezo: **150:–/nokto/persono**.

Eblas kompreneble pagi por tuta dometo, se oni volas elekti mem la kundormantojn.

Tre limigita nombro da litoj en nemodernaj dometoj sen duŝo ktp. ankaŭ ekzistas por eĉ pli favora prezo – bonvolu kontakti rekte al la kasisto de la kongreso por pliaj informoj (Tomas Jansson, tel: 018/12 73 79).

La dometoj situas en la kampadejo, *Fyris Camping*, de kie estas minimume duonhora promeno al la kongresejo. Ekzistas urba aŭtobuso.

SEJU-membroj kaj eksterlandaj gejunuloj povas ĝui senkoston surplankan dormadon. Adreson de la tranoktejo ni sendos post ricevo de la aliĝkoto.

Por tiuj kongresanoj, kiuj preferas dormi en hotelo, ni rekomendas la tute novan hotelon Svava, kiu situas vid-al-vid de la stacidomo. La supre indikitaj prezoj por tranoktado inkluzivas matenmanĝon. La promendistanco inter la kongresejo kaj Svava estas malpli ol dekminuta.

Svava

Bangårdsgatan 24
Tel: 018/13 00 30

Se vi flugos, alteriĝu en *Arlanda* kaj veturu per la aŭtobuso 801, kiu haltas vid-al-vid al la hotelo *Svava*.

De la stacidomo al la kongresejo estas promena distanco de 800 metroj. Iru trans la riveron *Fyris* en la direkto de la ĉie videbla katedralo. *Värmlands nation* troviĝas sude de la katedralo, ĉe la suda flanko de la placo *Riddartorget*.


Se vi venas peraŭte, sciuj, ke apud *Värmlands nation* estas kelkaj parklokoj, same kiel ĉe la alia flanko de la teologia fakultato. Ili estas senpagaj dum festotagoj, sed ne sabate. Verŝajne ili ne sufiĉos – tiam vi povos veturi supren al la strato *Thunbergsvägen* apud la biblioteko *Carolina*. Tie, en la Angla Parko (jes, kie oni dancas rumbon laŭ Owe Thörnqvist), vi trovos multajn parklokojn apud la kemia kaj fizika institutoj. Ili estas senpagaj ankaŭ sabate. De tie al la kongresejo la piedira distanco estas 450 metroj. Atentu, ke ekster la markitaj parklokoj oni rajtas lasi la aŭton dum nur kvin minutoj, eĉ festotage. (Se vi forgesas tion, vi facile perdos 250 kronojn.)

De la rekomendinda hotelo *Svava* vi povas facile promeni al la kongresejo. De la kampadejo *Fyris Camping*, kie troviĝas la kabanoj, estas dukilometra distanco.

Ni deziras al vi agrablan kaj interesan kongreson. *Plejbonas ja upsale!*

Bonan vojaĝon! Bonvenon al Upsalo!

La LKK de la upsala kongreso



La konata Esperanto-aktoro Jerzy Fornal el Pollando regalis per eĉ du diversaj prezentoj dum la kongreso.

SEJU-träff i Uppsala!



Kom och njut av försommaren på en ungdomsträff i vackra Uppsala! I anslutning till SEF-kongressen i pingst (29-31 maj) ordnar SEJU en 4-dagarsträff från fredagen den 28 maj kl. 18.00 till måndag den 31 maj. (Vi börjar alltså en dag före SEF-kongressen.)

Eftersom det alltid är fint väder i pingst-helgen så planerar vi en liten utflykt till Gamla Uppsala på lördagen. Resten av helgen följer vi delvis SEF-kongressens program med stadsvandring, bokauktion, underhållning m.m. På kvällarna har vi våra egna samkväm med spel, tedrickande och prat. Något slags firande blir det nog också, eftersom SEJU faktiskt fyller 35 år i år!

Avgift och anmälan: Anmäl dig till SEF-kongressen (se information här intill). Du behöver inte anmäla dig särskilt till SEJU-träffen. Frukost och kvällste ordnar vi själva, du betalar självkostnadspris. Lunch äter vi på stan.

Lokal: Ungdomsgården Tunet i stadsdelen Tuna backar, Torbjörnsgratan 2. Ta buss 10 från Stora Torget mot Flygflottillen. Gratis golvförläggning. Dusch saknas tyvärr, men annan duschmöjlighet kan troligen ordnas (kanske går vi på badhus eller äventyrsbad!). SEF-kongressen håller till på Värmlands nation vid Riddartorget.

Ta med: Sovsäck, liggunderlag, promenadvänliga skor, badkläder, ev. spel och musikinstrument.

Kallelse till SEJU:s årsmöte

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund håller årsmöte söndagen den 29 maj 1993 kl. 10.30 på Värmlands nation, Uppsala.

Alla hjärtligt välkomna!

Programo

por la jarkongreso de la Sveda Esperanto-Federacio en Upsalo inter la 29-a kaj 31-a de majo 1993

Sabate la 29-an de majo

- 14.00 La akceptejo en *Värmlands nation* (ĉe la placo *Riddartorget*) ekdeĵoras
- 16.00-18.30 Prezentado de videobendoj pri kulturaj aranĝoj, teatraĵoj kaj kantoj..
- 18.30- Vespermanĝo. Interkona vespero. Intervjuoj kun invititaj gastoj, i.a. el Tartu, la ĝemelurbo de Upsalo.
- 20.30- Mikaelo Bronŝtejn kantas.

Dimanĉe la 30-an de majo

- 08.30-10.00 Jarkunveno de la sveda sekcio de ILEI.
- 10.15-10.30 Kafo aŭ teo
- 10.30-11.30 Teatraĵo. *Aniara* de Harry Martinsson. Aktoras Jerzy Fornal. Adaptis por sceno Gunnar Gällmo. (Okazos en *Scandiascenen*, Trädgårdsgatan 6.)
- 10.30- Jarkunveno de SEJU
- 10.30- Jarkunveno de Eldona Societo Esperanto
- Antaŭtagmeze [Plia programero planata]
- 12.00 Solena malfermo de la kongreso kun invititaj gastoj
- 13.00-14.00 Tagmanĝo
- 14.00- Jarkunveno de SEF
- 16.00-16.15 Kafo aŭ teo
- 16.15-17.15 *La Esperanto-teatro preskaŭ centjara*. Prelegas Zofia Banet-Fornalowa.
- 17.15- Jarkunveno de Sveda Esperanto-Instituto (elektitaj reprezentantoj)
- 18.30-19.30 Teatraĵo: *Wolfgang* de Gunnar Gällmo. Aktoras Jerzy Fornal. (La prezentado okazos en *Scandiascenen*, Trädgårdsgatan 6.)
- 20.00-21.00 Vespermanĝo
- 21.00- Danco. Ludas la orkestro *Trattbandet*.

Lunde la 31-an de majo

- 08.15-09.00 Diservo aranĝita de la sveda sekcio de KELI
- 09.15-10.30 *La lingvaj problemoj de la Eŭropa Komunumo*. Hans Erasmus el Bruselo prezentas siajn vidpunktojn kaj sian problemanalizon metodon. Sekvos publika diskuto.
- 10.30-11.00 Kafo aŭ teo
- 11.00-12.00 Aŭkcio
- 12.15 Fermo de la kongreso
- 13.00-14.00 Tagmanĝo
- 14.00- Urba promeno kun vizito al muzeoj.



KONGRESSMÄRKEN!

Skicka inga brev utan
Uppsalakongressens brevmärke!
Beställ genom
pg-konto 481 43 95-2
SEF-jarkongreso

Pris inkl. porto

10 märken 15 kr
20 märken 25 kr
30 märken 35 kr

Gastoj en Japanio

Dum la somero de 1992 ni – Kerstin kaj Nils-Erik Kristoferson el Stockholm – iris al Japanio. Estis nia unua vojaĝo al la fora lando kaj ni havis tre favoran restadon. La tutan tempon ni vivis inter gastamaj japanoj, i.a. esperantistoj. Ni rakontos ion pri nia vojaĝo.

Loĝejo ĉe japana familio

Sapporo sur norda insulo Hokkaido estis nia ĉefa haltejo. Nils-Erik studis la japanan lingvon dum ses semajnoj ĉe unu el la multaj universitatoj de la granda urbo.

Sapporo estas moderna kaj internacie engaĝata urbo. Ekzistas en Sapporo gastiga organizo por kontaktoj inter japanaj familioj kaj eksterlandaj vizitantoj. Notu, ke la angla lingvo ne validas en la ĉiutaga vivo en Japanio. Por loĝi en familio, la gasto devas scii iom da japana lingvo.

Ni loĝis ĉe familio kun la nomo Ohtake, kio signifas "grandbambuo". Ni estis tre bonvenaj en la familio de kvar personoj. Ili loĝas en unufamilia domo kaj sekve en sufiĉe granda loĝejo. Unufamiliaj domoj postulas terpecon, kiuj troviĝas sur Hokkaido kun ĝia relative malgranda nombro de loĝantoj kompare kun aliaj tre dense loĝataj regionoj en Japanio.

S-ro Ohtake estas komercisto, ofte laboranta malfrue vespere. S-ino Ohtake prizorgas la familion, la domon kaj la ĝardenon. La manĝaĵo de s-ino Ohtake estis bonega kaj abunda. La japanoj bonguste manĝas. Krome, bele aspektas la manĝaĵo.

Renkontoj kun esperantistoj

Je la alveno al la flughaveno de Sapporo, Kerstin estis bonvenigita ne nur de la edzo, kiu estis en Sapporo jam unu monaton, sed ankaŭ de la estro de la esperanto klubo en Sapporo, s-ro Hiroo Kodama. Estis tre agrable en lia aŭto vojaĝi de la flughaveno al la familio Ohtake.

Ni estis ĉiusemajne invititaj partopreni en klubkunvenoj, kiuj okazis sabate inter la dua kaj la kvara horoj. La gastamaj klubanoj aranĝis feston por ni. Ne ofte venas eŭropanoj al Sapporo. La klubanoj bone memoris s-inon Spomenka Štimec el Zagreb, partopreninton en na-

cia esperanta kongreso en 1988. Post la japana vojaĝo ŝi verkis la libron "Ne senditaj leteroj el Japanio".

S-ro Kodama veturigis Kerstin dum tuttaga ekskurso sur suda Hokkaido. Ni estis en bela naturparko kun lago flankata de vulkanoj kaj en la urbo Tomakomai, kiu situas ĉe la maro. Grandaj ŝipoj kuŝis en la impona haveno, kiu estas artefarita sur antaŭa sabla bordo. Ankoraŭ du gastamaj esperantistoj akompanis nin en Tomakomai.

Kameoka

Kameoka estas urbo inter montaroj kaj riveroj apud Kioto. En Kameoka situas centro de la religia movado Oomoto kun oficejo de ĝia Esperanto-Propaganda Asocio.

De Sapporo ni vojaĝis per trajno la longan vojon al Kameoka. S-ro Takaŝi Agou, ĝenerala sekretario de Esperanto-Propaganda Asocio, bonvenigis nin. Li estis tre helpema dum nia tutsemajna restado en la gastejo de Oomoto. Samtempe li havis multe por fari en sia oficejo, ĉar en Kameoka ni spertis grandan travivaĵon: Oomoto solenis Someran Grandan Feston por celebri sian centjaran jubileon de la fondo.

Dum la dutaga Festo okazis poe-mara festo, kultura prezentado en la gran-

da urba halo, teceremonioj, polpoldandado vespere ktp. Ĉiuj povis partopreni en la dancoj. Bele vestitaj en kimonoj estis ankaŭ la malgrandaj infanoj kaj ili vigle dancis. Loka muzikgrupo sur alta estrado tondris muzikon el la regiono kaj kantis okaze de la Festo speciale verkitaĵojn. La atmosfero estis gaja kaj amikeca. Post la dancoj ĉiuj ricevis pecojn de akvomelonoj.

Kioto

La malnova imperiestra urbo Kioto havas multajn vidindaĵojn. Feliĉe por ni ankaŭ en Kioto troviĝas gastamaj esperantistoj. Unu sinjoro kaj du sinjorinoj gvidis nin dum multaj horoj en la urbo. Ni vidis la Oran Pavilonon konstruitan antaŭ sescent jaroj, la templojn Heian Jingu (ŝinto-religio) kun siaj centjaraj oranĝkoloraj domoj kaj ĝardeno kaj la tricentjaran Kiyomizudera (budhismo).

Ni atingis la templon Kiyomizudera per kruta strato kun malaltaj lignaj domoj. Promenante sur la mallarĝa strato, ni sentis la animon de la antaŭa ĉefurbo. Samtempe en la komenco de la strato estis ekzemplo de la moderna tekniko. Nia gastiganto parkis sian aŭton kaj aŭtomate el la grundo elŝoviĝis ferstango. Ĝi baris la eliron de la aŭto ĝis oni pagis la monon por la parkejo.



Teceremonio en Kameoka. Kerstin estas akompanata de japana mastrino.

Esperanto en Afriko kaj ni

Dum la 77-a Universala Kongreso en Vieno, Anita Bergh interparolis kun la UEA-komisiito pri afrika agado, Hans Bakker:

Hans Bakker ekinteresiĝis pri la afrika agado tuj kiam ĝi estis lanĉita dum la UK en Stokholmo en 1980, kaj jam tiam transprenis parton de la regiona agado.


En la komenco la laboro estis tute alia ol nun. Por veki intereson sufiĉis meti anonceton en ĵurnalon, kio rezultigis en amaso da petoj kaj reagoj. Tamen, post 3-4 jaroj la emfazo ŝoviĝis al konservado de esperantistoj, altigo de ilia lingva nivelo, instrukapablo kaj utiligado de la lingvo. Tiun duan etapon Hans Bakker bone priskribas en sia artikolo "Por plia jardeko de Esperanto en Afriko" en la revuo *Esperanto* de januaro 1990.

Al la demando pri la rolo de Esperanto en Afriko, Hans Bakker respondas:

"Ĝi havas sian tradician rolon de internacia komunikilo, kaj estas en Afriko pli utila ol en riĉaj landoj, kie teknikaj komunikiloj estas multe pli evoluintaj. La ĉiutaga scio pri tio, kio okazas aliloke en la mondo estas ĉe ni facile atingebla, sed en Afriko la situacio estas tute alia. Ekzemple en Tanzanio, homo ne havas televidon, malofte aŭskultas radielsendojn, li vivas en sia loko kaj ne havas iun ajn aŭ malmultan komprenon pri tio, kio okazas aliloke en la mondo. Esperanto tie estas multe pli komunikilo, malfermilo de horizonto, ol ĝi estas en riĉaj landoj. Homoj lernintaj Esperanton povas koresponde ekscii pri kulturoj de Siberio ĝis Japanio ĝis Argentino. Tiaj novaj spertoj estas granda riĉigo por la persono mem. Jen la ĉefa rolo de Esperanto en Afriko."

Pri la ĝemeliĝo inter SEF kaj Tanzania Esperanto-Asocio, Hans Bakker diras:

"Estas kompreneble perfekte, ĉar estus terure se nur mi sola okupiĝus pri la agado en Afriko. La ideo dekomence estis, ke tiun ĉi agadon partoprenu ĉiuj esperan-



La restoracio "Espero" en Daresalamo, Tanzanio, januare 1993. Ĝi estos ebleco por la tanzaniaj esperantistoj financi sian agadon, sed necesos ankoraŭ investoj. Donacojn peras SEF per la poŝtjira konto 20 12 - 3, Esperantoförbundet. Indiku ke temas pri "Daresalamo".

tistoj, kiuj nur iumaniere havas simpatian aŭ emon kontakti kun afrikanoj. Tio ne estas malfacila tasko, sed simpla korespondado, kiu tamen povas kreski al vera interŝanĝo, ne nur pri la vetero kaj pri la prezoj de varoj, sed pli profunda interŝanĝo de sentoj kaj spertoj per leteroj, per fotoj, per objektoj, per sonbendoj. La enhavo povas esti tre varia, instrua kaj riĉiga por ambaŭ flankoj."

Hans Bakker donas la jenan konsilon al svedaj esperantistoj por evoluigi la interrilatadon kun Tanzanio:

"Unue mi devas diri, ke mi estas tre feliĉa havi svedan kunlaborantinon, kiu enamiĝis al Tanzanio: Anita Dagmarsdotter. Ŝi agas tute memstare kiel kolego. La tasko, kiun eventuale povas havi SEF, estas korespondado, interrilatado kun la kluboj por interligado de perso-

naj kaj klubaj kontaktoj. Mi ĉiam emfazas, ke tio estas la unua afero. Poste ankaŭ materia helpo. Tio estas tre necesa por almenaŭ iomete faciligi al ili la funkciadon. Mi devas tamen samtempe akcenti, ke mono ne estas la ĉefa afero. Ofte la buĝetoj de afrikaj asocioj ŝvelas kaj atingas sumojn tute nerealistajn por UEA kaj verŝajne ankaŭ por SEF. Estas bone haltigi tiun evoluon kaj diri: Karaj amikoj, tio tute ne estas la senco aŭ celo de nia interrilatado. Klopodu pensi ne unuavice pri dolaroj, sed pri tio, kion oni povas fari per homaj rimedoj."

Al dezirantoj pliprofundigi sian scion, mi rekomendas la broŝuron "Agi en Eksterafrikujo", kompilitan de Hans Bakker kaj aperintan en 1991 (havebla de UEA, prezo 3 NLG + sendokostoj). Ĝi enhavas konsilojn kaj sugestojn pri kiel partopreni la afrikan agadon.

Parolante pri interrilatado kaj ĝemelado ĝenerale, kaj kun Afriko aparte, ni devas ĉiam memori, ke ĉio funkcias en ambaŭ direktoj. Novaj spertoj riĉigas ankaŭ nin mem kaj vastigas ankaŭ nian horizonton.

Ĝis revido Japanio!

Ni klinsalutas laŭ japana maniero kaj dankas pro neforgesebla restado en Japanio. Ni ricevis multajn geomikojn en la lando, kiu kombinas modernan teknon kun naciaj tradicioj.

Esperantistoj estas vojaĝemaj. Se eblos por vi iri al Japanio, vi certe estos same bonvenaj kiel ni. Kaj esperanto funkcias ankaŭ ekster Eŭropo.

Kerstin kaj Nils-Erik Kristoferson

Anita Bergh

Landa kongreso naskis esperanto-grupon

La pasintjara SEF-kongreso en Oskarshamn vekis sufiĉe multe da intereso pri esperanto en la urbo kaj postlasis plurajn artikolojn en la gazetoj kaj novan grupon, kiu entuziasme okupiĝas pri esperanto.

Iun sunan tagon en julio 1992 okazis la naskiĝfesto de la Esperanto-grupo de Oskarshamn. Birgitta Ekvall fariĝis prezidanto, Kerstin Rohdin sekretario, Gunilla Karlsson aranĝis klublibron, en kiu ŝi bele enkadrigos protokolojn kaj fotojn de la kunvenoj. La kasisto Inga-Maj Danielsson verve kolektas kotizojn kaj novajn membrojn.

Jam dum tiu unua festo la grupo ricevis honoran membron, nome Sergej Bondin el la siberia urbo Minusinsk, unu el la artistoj ekzpoziciintaj dum la kongreso. Dum la aŭtuno ni kune kun la popolaltlernejo de Oskarshamn aranĝis publikan malfermon de nova ekspozicio de pentraĵoj de Sergej. Li mem rakontis pri sia arto en esperanto kun interpretado kaj ankaŭ iomete en la sveda. Ĉeestis ĉirkaŭ 60 personoj.

Alia aranĝo estis publika muzikvespero – kunaranĝo inter la popolaltlernejo, la eklezia studorganizo SKS kaj la esperantogrupo. Ĵomart Amzejev kaj Nataŝa Gerlaŝ venis de Kristineberg en norda Svedio por koncerti. Ilia kortuŝa kantaĵo tiom interesis la ĉ. 70-personan publikon, ke spontane formiĝis 12-persona esperanto-kurso, kiu komencis sian laboron en januaro 1993 sub gvido de Birgitta Ekvall. Post la publika koncerto la esperanto-grupo finis la vesperon pli private kun pli da kantoj kaj babilado kun la gastoj.

La jaro 1993 komenciĝis per rigardado de filmo pri la kongreso en Oskarshamn, memorado pri tiu por ni granda evento kaj planado por la printempaj aranĝoj. Ĉeestis gasto el Makedonio, nun rifuĝinto loĝanta en Växjö. Li revenos por rakonti pri la okazajoj en iama Jugoslavio. Tio okazos en publika kunveno, kunaranĝata kun SKS. La saman tagon li informos pri la sama temo en priĉropa kurso en la popolaltlernejo.

Grava por la interesiĝo pri esperanto



Klubkunveno en Oskarshamn en decembro 1992. La tria de maldekstre estas la honora membro Sergej Bondin, kaj la kvina kaj sesa estas la gastoj Ĵomart Amzejev kaj Nataŝa Gerlaŝ. (fotis: Harold Brown)

inter la studentoj en la popolaltlernejo estas ankaŭ la fakto, ke Sergej Bondin nun studas tie. Kiam la lernejoj surscenigis kristnaskan teatraĵon, Sergej faris la scenografion.

Ĉiu klubaranĝo komenciĝas per unu horo da esperanto-kurso en kunaranĝo kun SKS. Ni planas produkti sonbendon

kun parolo kaj kantado de ĉiuj kaj sendi ĝin al Radio Estonia, por kiu ni ankaŭ donacabis *La Esperon*. Eble ni ankaŭ provos fari malgrandan ekspozicion pri Oskarshamn en esperanto por la klubo de Tallinn.

Kerstin Rohdin


Muzik-kasedo

Procesio multkolora de Kajto

Esperanto-Centro havas ĝuste nun kelkajn je bona prezo: 90 kronoj.

Kajto estas nederlanda muzikgrupo, kiu ludas en la stilo de stratmuzikistoj, ritme kaj facile. Bona sonregistro! Mendu tuj de:

Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21,
111 38 Stockholm



Kunlaboro inter radiostacioj

Radio Esperanto en Västerås kunlaboras kun la esperanto-fako de Radio Polonia en Varsovio. La redakcioj interŝanĝas raportojn kaj pretajn programojn. La lasta ekzemplo estis la lingva seminario en Kungälv ĉi-aŭtune. Västerås surbendigis kaj Varsovio dissendis.

Novaj kaj tradiciaj ideoj en Falköping

La klubo en Falköping kunaranĝis la potentan promenadon (*tipspromenad*) de la sporta societo Korpen. Kelkaj el la demandoj temis pri Esperanto. La klubo ankaŭ agadas pli tradicie: per ekspozicioj en bibliotekoj kaj per proksimradio. Diversaj agadoj estas bezonataj!

Press-klippare søkes!

Vi söker en person som vill ta emot pressklipp från SEF-medlemmar runt om i landet och sedan med jämna mellanrum rapportera till *La Espero* om vad som har skrivits om Esperanto.


Känner du dig kallad att hjälpa SEF med denna roliga och viktiga uppgift, skriv då till "**Press-klippare**", **Esperanto-Centro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm.**

Motala kaj Pwani ĝemeliĝis

La esperantokluboj en Motala kaj Pwani, Tanzanio, ĝemeliĝis. La Motala-anoj aranĝis presadon kaj distribuadon de la tanzania esperanto-revuo *Orienta Stelo*. Anita Bergh, el Upplands Väsby, vizitis la klu-

bon, rakontis pri vojaĝo en Tanzanio kaj montris lumbildojn. Ŝi ankaŭ transdonis personajn salutojn ĝuste el Pwani. La

komento de la esperantistoj en Motala estis: "Nun ili por ni havas nomojn kaj vizaĝojn. Nun ni pli facile kunlaboros."



Januaraj gastoj: Guy Matte (maldekstra bildo) el Kanado pasigis semajnon en Svedio partoprenante profesion konferencon. Li estas ĝenerala sekretario de instruista sindikato. Flanke de tio, li estas korektisto de franclingva esperantokurso en unu el la internaciaj komputilretoj.

(Dekstra bildo) Estrarano de Islanda Esperanto-Asocio, Ragnar Baldursson, preterpasis Svedion revenante post vojaĝo en Ĉinio, kie li vojaĝis kun sia edzino Ming Chen. En Islando, li laboras per la lingvoj ĉina kaj japana instruante ilin, tradukante kaj helpante turistojn.



SEJU

Kurshelg för barn och ungdomar

SEJU arrangerar i vår en kurshelg i Skåne. Träffen vänder sig till alla nybörjare och fortsättare i SEJU-ålder, d.v.s. 0–30 år. Barn får gärna ta med sig sina föräldrar.

Kursledare blir Anna-Maria Lange från Lund och Inga Johansson från Göteborg. Förutom kurser blir det lekar, spel, skogspromenader, gemensam matlagning och annat kul.

Eftersom SEJU inte ordnar kurshelger så ofta, hoppas vi att alla intresserade passar på att komma!

Tid: 16–18 april 1993 (helgen efter påsk), fredag kl. 17.00 till söndag kl. 14.00.

Plats: Mysiga scoutstugor i Furulund, utanför Lund (tel: 046/73 33 44)

Vägbeskrivning: Från Lund: Ta buss 123 till Furulunds station (20

min.), eller ta pågatåget till Kävlinge och därifrån anslutningsbuss till Furulund. I Furulund: Mittemot posten går en väger, följ den ner i 10 min. Där sätter vi upp en skylt till scoutstugorna.

Avgift: 200 kr om du anmäler dig innan, 250 kr om du kommer oanmäld.

Anmälan: Betala in avgiften på SEJU:s postgirokonto 51 33 01–2. Ange namn och adress samt om du är nybörjare eller fortsättare.

Ta med: Ordbok, papper och penna, sovsäck och underlag, skor för skogspromenader, ev. spel och musikinstrument. Obs! Lokalerna saknar dusch.

Frågor besvaras av Åsa Andersson (tel: 0470/469 48) eller Kajsa Larsson (08/97 46 26).

(Mera SEJU på sidan 5)

Tra la mondo

Islamaj esperantistoj

Antaŭ nelonge fondiĝis en Irano la Tutmonda Islama Movado Esperantista. Ĝin prizorgas s-ro Gholam R. Abadi. TIME eklaboras kun naŭ kunlaborantoj kaj bonvenigas Esperantajn referaĵojn, bultenojn, librojn kaj gazetojn el la tuta mondo. Ĝi volas kunlabori kun esperantaj organizaĵoj kaj aliaj. Skribu al: Gholam R. Abadi, P.O. Box 345-63515, Bandar Mahshahr, Irano.

Disertacioj pri esperanto

Stipendio Ivo Lapenna por universitataj disertacioj pri esperanto aŭ interlingvistiko en 1992 estis aljuĝita al: 1. D-ro Benoît Philippe, Germanio, por *Lingvoŝanĝiĝo ĉe planlingvo je ekzemplo de Esperanto*; 2. D-rino Marina Mázzerro, Italio, por *La lingvoj en la Eŭropa Komunajo, kun aparta atento pri la angla*; 3. S-ro Andy Künzli, Svislando, por *Interlingvistiko kaj Esperanto en la cara regno kaj en Sovet-Unio*.

Detalan regularo pri la disdonado de stipendioj oni povas ricevi de: **Fondaĵo Ivo Lapenna, S-ro Torben Svendsen, Vanløse Allé 57, 1.tv., DK-2720 Vanløse, Danio**. Kunsendu internacian respondduponon.

La Espero en 1993

La eldondatoj por *La Espero* dum 1993 estos proksimume:

	Limdato por materialo:	Aperdato:
N-ro 2	25 marto	5 majo
N-ro 3-4	7 junio	15 julio
N-ro 5	26 aŭgusto	7 oktobro
N-ro 6	28 oktobro	2 dec.

Memoru ke malfruaj manuskriptoj malfruigas la revuon!

Nya medlemsavgifter till UEA

P.g.a. kronans fall gäller nedanstående avgifter fr.o.m. den 1 februari. Som direktmedlem i UEA ger du världsförbundet ett extra stöd, samtidigt som du själv får en del förmåner, t.ex. nedsatt kongressavgift för kategorierna **MJ**, **MA** och **DM**. UEA behöver allt vårt stöd för att kunna genomföra sin arbetsplan. Även gåvor emottages med största tacksamhet. Pengarna kan skänkas till bl.a. fonderna **Canuto** (medlemsavgifter för esperantister i utländer), **Ameriko** (rörelsen i Latinamerika), **Biblioteko** (UEA:s bibliotek) och **Volontulo** (för ungdomspraktik vid UEA:s huvudkontor i Rotterdam) eller till UEA:s allmänna kassa.

Avgifterna för 1993:

MA Medlem med årsbok och tidskriften <i>Esperanto</i>	370 kr
MJ Medlem med årsbok (ungefär 400 sidor)	150 kr
MG Medlem med <i>Cvidlibro</i>	60 kr
SZ Societo Zamenhof, för den som vill ge UEA ett extra ekonomiskt stöd. (Medlemskap ingår ej.)	740 kr
PT Patrono de TEJO, stöd till ungdomsförbundet TEJO, <i>Kontakto</i> och andra TEJO-trycksaker ingår. (Medlemskap ingår ej.)	375 kr
DML Livstids medlemskap med livstids prenumeration på årsboken och <i>Esperanto</i> .	7750 kr

Den som ännu inte fyllt 30 år 1 januari 1993 och blir medlem i någon av kategorierna MJ, MA eller DM får även *Kontakto* och *TEJO-tutmonde*. Ange därför födelsedatum.

Avgiften kan betalas in på **pg 14 74 29 - 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby**. Ange på talongen vad betalningen avser. Förfrågningar kan göras hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.

Seminarium: Ludo kaj laboro

Ĉu Esperanto-aktivado transiradas de kluboj al individuoj? Kiu estas la rolo de individuo en Esperanto? Ĉu la koncepto "Movado" ankaŭ gravas? La "interna ideo" hodiaŭ.

Tiuj kaj aliaj aktualaj temoj diskutigos en seminariumo, kiun aranĝos Suda Distrikto de SEF 13-14 marto 1993.

- Loko:** La Esperanto-klubejo en Malmö, Kronatorpsgatan 94.
Tempo: La 13-an de marto: 10h00-16h00, lunĉopaŭzo 12h00-13h00.
La 14-an de marto: 10h00-12h00.
Kotizo: SEK 115, inkluzive materialon

La seminariumo donos eblecon pri-informi kaj pridiskutigi aktualajn (proprajn aŭ klubajn) projektojn, programojn aŭ proponojn.

Kiel unu fonto de diskutumaterialo ni utiligos la libron "Idébok för Esperantoklubbar", kiun SEF eldonis en 1992. Ni ankaŭ provludos "instruludon".

Dum la seminariumo prezentigos duonhora teatraĵo, "La prelego".

La seminariumon gvidos Kerstin Rohdin kaj Harold Brown.

Aliĝo: Pagu la kotizon al **pgk 13 28 25-1**, kaj anoncu vian aliĝon al **Ann-Christine Krondahl, Sjørupsvägen 102, Aspult, 290 11 Linderöd, tel: 044/32 5164**

(Post la seminariumo, la 14-an de marto je 13h00 okazos en la sama ejo jar-kunveno de la Suda Distrikto.)

Kiu aŭ kio estas fotografo?

En unu el la numeroj de la revuo *Esperanto*, kiu aperis antaŭ kelkaj jaroj, la legantoj ricevis varmajn bondezirojn de la personoj, kiuj produktas la periodaĵojn. Inter tiuj homoj troviĝas "kunlaborantoj, kompostistoj, enpaĝiganto, fotografo, presisto, leganto de presprovaĵoj, redaktoro".

Demando: Kiu el la cititaj nomoj ne estas ĝusta laŭ lingva vidpunkto?

Respondo: Fotografo.

La vortoj *kunlaboranto*, *enpaĝiganto* kaj *leganto* estas formitaj per radiko + **-ant-**, sufikso de la aktiva prezenca participo, kiu en substantiva formo signifas personon, kiu plenumas funkcion.

En *kompostisto* kaj *presisto* la sufikso **-ist** aldonita al verba radiko esprimas, ke la persono daŭre aŭ ĉefe okupiĝas pri la afero difinita de la radiko.

Redaktoro estas sinonimo de *redaktisto* kaj, kvankam ĝia radiko estas **redaktor-**, plua analizo montras, ke **-or** estas pseŭdosufikso en Esperanto, kiu funkcias kiel vera agant-sufikso en la etnolingvaj etimoj de vortoj kiel *redaktoro*, *aktoro*, *direktoro*, *gubernatoro* ktp.

Restas fotografo, kiun oni povas analizi laŭ la Schwartz-a etimologia metodo jene: *fotografo* = **foto** + **grafo** = *grafo de foto*(!).¹ Tamen, tia malserioza traktado certe ne ricevos la aprobon de la komisiitoj de la Lingva Servo de UEA.

Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro (PIV)*, *fotografo* devenas de la verbo **fotograf/i**. Sekve, *fotografo* aŭ *fotografado* devas esti la ago aŭ arto fari *fotografajojn*, kaj la persono faranta ilin estas *fotografanto* aŭ *fotografisto*. La uzo de la formo *fotografo*

kun la signifo "persono, kiu fotografas" implicas, ke (1) ekzistas ankaŭ substantiva radiko **fotograf/o**, aŭ ke (2) **fotograf-** estas hibrida radiko, parte verba, parte substantiva! La substantiva uzo sendube rezultas el nacilingva uzo: kp. francan *photographe*, germanan *Photo-*



graph aŭ *Fotograf*, hispanan kaj portugalan *fotógrafo* kaj rumanan kaj slavan *fotograf*. Sed tiu senbezona komplikaĵo estas nur balasto en Esperanto; unu radiko sufiĉas por logike pluformi la aliajn vortojn. Nu, leviĝas la demando: ĉu la radiko estu verba aŭ substantiva? La plimulto de la eŭropaj lingvoj subtenas la vastan internaciecon de *fotografo* kun senco de aganto; fakte, ne estas eĉ unu lingvo, laŭ mia scio, kiu havas vorton kun la sufikso **-ist**, do oni povas argumenti, ke *fotografisto* tute ne estas internacia formo. Tamen, ĝi estas regule pluformita laŭ maniero, kiu karakterizas la vortformadon en Esperanto. Cetere, la verba radiko havas la apogon de grava fonto, verko de Zamenhof mem: En §32 de la *Ekzercaro* troviĝas la frazo: "La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotografajon al mia patro."

La scienca sufikso **-graf** devenas de la helena verbo *graphein* (skribi) kaj pro sia polisemia naturo, ĝi okazigas proble-

mojn ankaŭ rilate aliajn vortojn en Esperanto. Laŭ *PIV*, **-graf** signifas (1) la praktikanton de arto aŭ tekniko: *geografo*, *tipografo*, *kaligrafo*; (2) (kiam ne povas temi pri persono) la koncernan aparaton: *telegrafo*, *hektografo*, *kronografo*. Sed *PIV* preteratentas aliajn signifojn de la plurfaceta **-graf**. Ĝi signifas ankaŭ (3) la rezulton, produktaĵon aŭ objekton de la koncerna arto aŭ tekniko: *epigrafo*, *holografo*, *aŭtografo*; (4) kiel verbo, pritrakti arton aŭ teknikon: *fotografi*, *daktilografi*, *litografi*; (5) en la substantiva formo **-grafio**, ion verkitan aŭ skribitan kiel sciencobranĉon: *monografio*, *stratigrafio*, *oceanografio*.

La malsimetrioj de la formado de la vortoj por la nomoj de sciencoj kaj iliaj praktikantoj, aparatoj kaj produktaĵoj, rezultoj aŭ studobjektoj rezultas el la plureco de formoj en diversaj etnaj lingvoj. Esperanto heredis tiun ĉi kaoson, aplikante la 15-an regulon de la Fundamenta gramatiko. Espereble suplemento de tiu regulo estos ellaborita en la ne tro fora estonteco, por ke niaj leksikografoj kaj fakuloj havu konkretajn gvidliniojn por la esperantigo de la t.n. internaciaj vortoj. Dumtempe ŝercemuloj en Esperantujo povas amuziĝi, same kiel Raymond Schwartz, per *agrafo*, *margrafo* kaj ĉiuj aliaj loĝantoj de la verda graflando.

Bernard Golden

¹En sia amuza poemo "La Stranga aventuro de Grafo Dormanski", Raymond Schwartz priskribas parazitan nobelon, kies sola vivoceco estis "kuŝi en lito", do li estis "litografo".



Klistermärken!

10 stora dekaler

eller

5 ark à 24 små klistermärken

50 kronor

Beställ från Esperanto-Centro idag!

La unua internacia esperantista geedziĝo

Nuntempe anoncoj pri geedziĝoj inter geesperantistoj estas ĉiutagaĵo en la Esperanto-gazetaro. Jam de longe oni parolas pri "edzperanto", tre trafa vorto de la esperanta slango. Kompreneble, la plej interesvekaj nuptaj novaĵoj koncernas diversnacianojn, kiuj renkontiĝis en Esperantujo. Mi ankoraŭ ne sukcesis malkovri donitajn pri la unua geedziĝo inter samnaciaj esperantistoj, sed la verŝajne unua internacia geedziĝo okazis en 1899, kaj la novgeedzoj estis nordianoj. La edzo eĉ dufoje "edzperantistiĝis", ĉar post la morto de sia unua edzino li denove edziĝis al alilandano en 1925. Ĝi estis la filino de unu el la pioniroj de la Esperanto-movado en Ruslando. Ĉu vi scias, pri kiuj temas?

Valdemar Langlet, pioniro de la sveda Esperanto-movado, edziĝis al Signe Blomberg, kun kiu li konatiĝis pere de Esperanto, la 3-an de aŭgusto 1899 en Åbo (Turku), Finnlando. Tiutempe Finnlando estis parto de la Rusa Imperio.



Langlet (sidanta, kun ĉapo) en Jalto dum prelegvojaĝo en 1895. Dekstre sur la bildo sidas Antonina Ĉajkovskaja, kiu 30 jarojn poste fariĝos lia bopatrino.



Valdemar Langlet estis i.a. la unua prezidanto de SEF, kiam ĝi fondiĝis en 1906.

Langlet naskiĝis en 1872 en Lebro, Svedio, kaj esperantistiĝis en 1890. Dum li ankoraŭ estis universitata studento, li kunfondis en 1891 la Esperanto-grupon en Upsalo. Post ĉesigo de la revuo *La Esperantisto*, Langlet helpis lanĉi novan internacian gazeton *Lingvo Internacia* en 1895. Dum la sekvaj jaroj Langlet faris poresperantajn vojaĝojn tra Rusio, Turkio, Rumanio, Aŭstrio-Hungario kaj Germanio.

Post la morto de sia unua edzino en 1921, Langlet edziĝis al Nina Borovko en Moskvo en 1925. Ŝi estis la filino de la esperantista amiko de Langlet, Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1863–1913), konata al esperantistoj pro la fama letero, kiun d-ro Zamenhof skribis al li pri la deveno de Esperanto. Ankaŭ Borovko "edzperantistiĝis". Lia edzino estis la rusa esperantistino Antonina Justinovna Ĉajkovskaja, kiu akompanis Langlet kiel Esperantogvidistino dum lia vizito al Krimeo en 1895.

Bernard Golden

Miniaturaj rakontoj – bona ekzerco!

En 1982 la brita ĵurnalo *Telegraph Sunday Times* aranĝis konkurson pri miniatur-rakontoj aŭ **miniaturaj**. Enfluis ne malpli ol 32 000 kontribuajoj (*bidrag*). La ideon poste kopiis la kanalo 4 de la brita radistacio BBC en la jaroj 1985 kaj 1986. Ĉi-foje venis 100 000 kontribuajoj!

Miniatura rakonto laŭ tiuj reguloj devas plenumi tri kondiĉojn:

1. La teksto devas ampleksi precize 50 vortojn (49-vorta aŭ 51-vorta rakonto do ne estas miniaturo).
2. La titolo de la rakonto rajtas ampleksi ĝis 15 vortojn krom la teksto.
3. Devas esti rakonto, kiu priskribas ekzemple senton, ideon aŭ situation el la ĉiu-taga vivo. (Ne estas malpermesite esti humura, se eblas.)

Sube sekvas ekzemplo:

Frua vespero.

Neĝo falas sur la kampoj. Tra la fenestro mi vidas bildon de vintra pejzaĝo. Infanoj skikuras aŭ ĵetas neĝbulojn. Estas nun la tria horo, kaj la suno komencas malaperi malantaŭ la horizonto. La infanoj jam ĉesas ludi.

Estas frua vespero por ili, kiel por mi, kiu atingis mian kvindekvaran datrevenon.

Provu mem skribi miniaturon. Estas bona ekzerco!

Karl-Gustaf Gustafsson

Annonsera i La Espero!

Småannonser kostar tio kronor per rad. Lägsta kostnad är dock 50 kr. Högst tio rader per person och tidskriftsnummer. Annonser beställes hos redaktören.

Kontakta redaktören om priser för större annonser!

Utan gåvor stannar Esperanto- förbundet!

Den ekonomiska krisen slår hårt också mot SEF:s ekonomi. Utgifterna stiger kraftigt samtidigt som inkomsterna minskar.

Enbart hyran för Esperanto-Centro är nu 93 536 kr om året. Därtill kom under fjolåret 27 279 kr för övriga utgifter för EC: tele, el, försäkringar, renovering, m.m.

Många medlemmar har uttryckt glädje över att *La Espero* nu har ett prydligt tryck. Men det kostar naturligtvis mycket mer än när tryckningen var mer amatörmässig. Därtill kommer postens starkt stigande avgifter för distributionen. Sammanlagt har det för fjolåret betytt en kostnad för *La Espero* på inte mindre än 46 255 kr, och då är ändå utgiften för informationsnumret, som gick på 14 250 kr, inte medräknad.

En organisation med något över tusen medlemmar kan inte i längden tåla dessa utgifter utan betydligt högre medlemsavgifter. De senaste årens höjningar med 10 kr per år har dock visat att det knappast är möjligt att fortsätta höjningarna. Det är lätt att säga att några tiotus om året inte betyder något för en medlem, men sanningen är den att våra medlemmar oftast också tillhör kanske ett tiotal andra organisationer, som också höjer sina avgifter. Följden blir att man lämnar någon eller några organisationer. Tyvärr visar det sig att det i många fall blir SEF!

Därför måste SEF åter vädja till medlemmarnas offervilja. Flera möjligheter finns. Du kan t.ex. bli medlem i **Klubo Mil** genom att skänka ett belopp på 1000 kr (lämpligt även för våra klubbar). Men naturligtvis är även andra belopp välkomna!

Detta är enda möjligheten att behålla Esperanto-Centro och *La Espero* sådana vi har dem idag.

Dina gåvor och bidrag kan sättas in på **pg 20 12-3, Svenska Esperantoförbundet**.

SEF-kassören

Nya priser på tidnings- prenumerationer

På grund av det ekonomiska läget gäller inte längre den lista över tidningspriser som publicerades i förra numret av *La Espero*. Nedan följer en uppdaterad prislista. Obs! Priserna kan komma att stiga ytterligare p.g.a. osäkerheten på valutamarknaden.

Bulgara Esperantisto , Bulgarien	12 nr/år	130 kr
El Popola Ĉinio , Kina	12 nr/år	200 kr
Esperanta Finnlando , Finland	6 nr/år	60 kr
Eventoj , Ungern (flygpost 275 kr)	24 nr/år	235 kr
Fonto , Brasilien	12 nr/år	145 kr
Heroldo , Italien (flygpost 180 kr)	16 nr/år	150 kr
ICEM , Frankrike	12 nr/år	125 kr
Informoj de EAE , Estland		80 kr
Juna Amiko , Ungern	4 nr/år	50 kr
Kontakto , Nederländerna	6 nr/år	110 kr
Kulturaj Kajeroj , Frankrike	4 nr/år	100 kr
La Espero el Koreio , Sydkorea	6 nr/år	70 kr
La Jaro , Belgien (flygpost 55 kr)	årskalender	40 kr
La Kancerkliniko , Frankrike	5 nr/år	130 kr
La Letero de l' Akademio , Frankrike	4 nr/år	155 kr
La Ondo , Ryssland	6 nr/år	75 kr
Literatura Foiro , Schweiz	6 nr/år	170 kr
Litova Stelo , Litauen	6 nr/år	80 kr
Monato , Belgien (flygpost 315 kr)	12 nr/år	270 kr
Norda Prismo , Finland	4 nr/år	100 kr
Norvega Esperantisto , Norge	6 nr/år	75 kr
Oomoto , Japan	2 nr/år	75 kr
Paco , Belgien		95 kr
Ruslanda Esperantisto , Ryssland	12 nr/år	60 kr
Scienca Revuo , Schweiz	2 nr/år	140 kr
Vjetnamio , Vietnam	4 nr/år	100 kr

Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på **pg 14 74 29-5, Svenska Esperanto-Förbundets specialkonto, Hörby**. Ange vilka tidningar som avses. Förfrågningar angående tidningsprenumerationer kan göras hos: **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52**.

DONACOJ

Margit Rudolphson, Karlshamn 100. Anonimaj donacoj per banka aŭ posta giro sume 425.

Je memoro de Åke Blomberg: Sven Möllestad, Helsingborg 500.

Memore de David Sandström: Erik Svärd, Malmö 100.

Klubo Cent: Ove Kleborgh, Hässleholm 100. Ljungby Esperantoklubb 100. Gustav Nygård, Göteborg 100. Estrid Lind, Krylbo 100. Jan kaj Anna-Greta Strönne, Malmö 200. Ivar Andersson, Hälleforsnäs 100. Tore Gustavsson, Skövde 100. Tore kaj Signild Johansson, Kalmar 200.

KLUBO MIL

Membroj en 1992:

1. Sven Möllestad, Göteborg
2. Britta kaj Arne Andersson, Halmstad
3. Bertil Bengtsson, Hallsberg
4. Jan Milld, Västerhaninge
5. Helsingborgs Esperantoförening
6. Gösta Hedlund, Uppsala
7. Karl Rönnerberg, Västerfärnebo
8. Sixten Green, Helsingborg

Novaj membroj povas aliĝi pagante SEK 1000 (aŭ pli) al pĝk 20 12-3. Kluboj! Sekvu la ekzemplon de Helsingborg!

Ĉu letera rondo estus io por vi?

Temas pri letero aŭ sonkasedo cirkulanta de unu rondano al la sekva, al kiu ĉiu aldonas sian kontribuon. Mi mem partoprenis en kelkaj rondoj kun interesaj personoj en Francio. Mi kredas, ke tio povas esti bona modelo por tiuj esperantistoj, kiuj loĝas longe for de iu klubo.

Por ĉiu rondo estas bezonataj respondecul(in)o kaj 3–5 partoprenantoj.

La respondecul(in)o

- Konservas la nomojn kaj adresojn de la partoprenantoj.
- Faras korektojn en la leteroj de la partoprenantoj por plibonigi ilian lingvoscion.
- Kontrolas la fluon de la rondo. (Tio okazas per malgrandaj folioj, kiujn la partoprenantoj samtempe sendas al la respondecul(in)o, kiam ili plusendas la cirkuleron.)
- Rememorigas tiujn partoprenantojn, kiuj bremsas la rondon.
- Raportas interesajn erojn al la legantoj de La Espero.

La partoprenantoj

- Ĉiu skribas libere tion, kion li/ŝi deziras, sed skribu legeble. (Ne tro densaj paĝoj, kiuj riskas malkuraĝigi la malpli spertajn partoprenantojn.)
- Ĉiu rondo povas (kaj devas) efektiviĝi sian tutan rondiron ene de maksimume unu monato – la cirkulero do restas ĉe ĉiu partoprenanto dum ne pli ol 4–5 tagoj.
- Plusendante la cirkuleron al la sekvano, sendu samtempe la raportfolio-ton al la respondecul(in)o, kiu ĉiam devas scii, kie troviĝas la cirkulero.
- Por ke la sendokostoj ne fariĝu troaj, ĉiu povas ekde la 3-a rondiro elpreni siajn foliojn de la 1-a. En la rondo do ĉiam cirkulos du kompletaj rondiroj, por ebligi la relegon de iu fragmento.

Ĉu tio ĉi sonas interese al vi? Skribu leteron al "Rondiro", Esperanto-Centro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm, indikante, ĉu vi pretas fariĝi respondecul(in)o aŭ nur volas partopreni en iu rondo.

Kaisa Hansen

Kalendaro

MARTO

27–28 **Jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio.** Århus.

APRILO

9–16 **9-a Printempa Semajno Internacia.** Oberbernhards/Rhön, apud Fulda. (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, D-W-Bad Neuenahr-Ahrweiler, Germanio)

16–18 **Printempa renkontiĝo de SEJU.** Proksime al Lund. Vidu paĝon 9 en tiu ĉi *La Espero*.

MAJO

28–31 **Junulara renkontiĝo en Uppsala.** (Jarkunveno de SEJU.) Vidu paĝon 5 de tiu ĉi *La Espero*.

29–31 **Sveda Esperanto-Kongreso,** Uppsala. Vidu paĝojn 3–5 de tiu ĉi *La Espero*.

JUNIO

6–12 **15-a Ĉebalta Esperantista Printempo.** Mielno. (Pola Esperanto-Asocio, skr. poczt. 30, PL-75-016 Kaszalin -1, Pollando)

JULIO

2–4 **Internacia Renkontiĝo.** Tallinn (J. Ojalo, Narva mnt. 9-5, EE-0001 Tallinn, Estonio)

20–23 **Oficiala antaŭkongreso en Barcelono.** (Barcelona Esperanto-Centro, Carreras i Candi 34 - 36, E-08028 Barcelono, Hispanio)

24–31 **78-a Universala Kongreso de Esperanto.** Valencio.

AŬGUSTO

7–14 **49-a Internacia Junulara Kongreso.** Vraca. (Loka Kongresa Komitato, p. k. 26, BG-3000 Vraca, Bulgario)

19–22 **Kultura Esperanto-Festivalo 4.** Kopenhago. (KEF 4, p/a Jakob Nordfalk, Nørre Allé 75/571, DK2100 København Ø, Danio)

"Antaŭ nelonge mi aĉetis kaj legis vian libron Orm La Ruĝa. Tutkoran dankon pro via decido traduki ĉi tiun verkon esperanten. Mi multege ĝuis ĝin!!! Pure literaturaj tradukaĵoj gravas, sed ankaŭ gravas simpla bona rakonto, plezurdo-na legado. Orm La Ruĝa estas tia, kaj mi rekomendos ĝin al ĉiuj miaj legantaj amikoj."
– Gerard Capdevielle (Usono)


Frans G. Bengtsson:

Orm la ruĝa

(trad. Bertil Nilsson)

Prezo: SEK 135. Esperantoförlaget, Box 7502, 200 42 Malmö

Krucvortenigmo



Horizontale:

- | | |
|---------------------------|---------------------------------------|
| 1. Li donas sian scion | 6. Mola kotonaf' – Monat' – Antaŭ sol |
| 2. Nederlanda verkisto | 7. Vojpartan – Ir' |
| 3. Dokumentujoj – kontraŭ | 8. Romia despot' – Spirgas' |
| 4. Subita ĝojegesprimo | 9. Helpantoj |
| 5. Tute similaj | 10. Maniero – Sen prokrasto |

Vertikale:

- A. Miksas sin en aferon
 B. Prefikso – Certig'
 C. Oficista
 Ĉ. Fari pli ol necese (radiko) – Malantaŭ
 D. Ĉevalamiko sur dorso
 E. Finaĵo de verbo – Svingmov'
 F. En spirito estantaj – Prezenca sufikso
 G. Bruo, knaro, muziko – Postulu ĝentile
 Ĝ. Agoj
 H. Kredas

Kompilis: **Lennart Persson**

Solve de la krucvortenigmo en La Espero n-ro 6/1992

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	K	O	N	F	E	R	E	N	C	O
2	O	R	E	L	O	■	L	E	O	N
3	R	I	K	A	N	I	S	■	L	I
4	M	O	R	N	A	■	T	R	A	K
5	A	N	O	■	■	P	I	A	■	S
6	L	O	L	■	V	E	R	S	T	O
7	S	■	O	K	O	N	A	■	O	■
8	A	N	G	O	R	O	N	■	S	E
9	N	E	O	N	■	S	T	A	T	O
10	A	K	N	E	O	■	O	V	A	L

"Själv kommer jag att göra flitigt bruk av Vilborgs utmärkta ordbok, och jag kan bara gratulera den som börjar lära sig esperanto nu."

- Bertil Wennergren

Pris: 400 kr

Ordbok Svenska-Esperanto.

Ca 500 sidor, inbunden. Med de nyaste orden. Priset inkluderar moms och porto.

Postgiro 578-5,
Esperantoförlaget

Malmö Esperantoförening
Kronatorpsg 94
21227 Malmö

Esperantoförbundet, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm

ANONCETOJ

Köpes: Enstaka värdefulla böcker (svenska, esperanto o. a. språk) och hela boksamlingar köpes: Tomas Jansson, Storg. 13, 753 31 Uppsala, tel: 018/12 73 79.

Latva eldonejo/presejo volas kunlabori kun alilandanoj: Zigfrids Polaks, Krizantemu 11, Katlakalna r. Riga, LV-2111 Latvio.

Vinnare i tipspromenaden på Esperanto-Centro 19 september: 1. Elsa Dagerblom, Stockholm (Etimologia vortaro, valfritt band); 2. Agneta Järström, Upplands Väsby (Folioj de miaj memoroj); 3. Hillevi Sundholm, Västerås (samma pris).

Den som vill bli medlem i Sveriges Lärare Esperantoförbund kan betala 85 kr. till postgirokonto nr 3 14 30-2.

Dezirar korespondi:

Mohamad Ali Amiri, Karami Plak 75, Karbar, Foroshi, Shamio Nabsh Lin-E-14, Abadan, Irano.

25 jara fraŭlo, studento pri filozofio kaj psikologio pri vojaĝoj, turismo, politiko, legado k.t.p. Se eble sendu internacian respondkuponon: Malanda Nianga Emilo, Ass. de Kinshasa., B.P. 691, Kinshasa I, Zairo.

Skrivning för

Esperanto-examen

såväl för högre som lägre, äger i år rum söndagen den 25 april. Anmälan senast en vecka tidigare till:

Svenska Esperantoinstitutet
c/o Ebbe Vilborg
Prästgårdsängen 2
412 71 Göteborg

dit också förfrågningar om examensfördringar o.d. kan ställas.

Kongressen i Valencia 24-31 juli 1993.

Tyvär gäller ej längre de priser som publicerades i förra numret av La Espero. Här nedan finns de aktuella. Kongressavgifterna anges i svenska kronor:

Kategori	till 930331	från 930401
Direktmedlem i UEA (DM, MJ eller MA)	1065	1275
Ej direkt medlem i UEA	1335	1585
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1993-01-01), direktmedlem i UEA	540	640
Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är direkt medlem i UEA	800	955

Avgifterna kan komma att justeras uppåt i händelse av kursändring. Detta meddelas i så fall i nästkommande nummer av La Espero. Inför kongressen i Valencia finns även möjlighet att förhandsbeställa hotellrum. Blankett för detta kan liksom anmälningsblankett för kongressen beställas hos: **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.** Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till: **pg 14 74 29 - 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby.** Ange på talongen vad betalningen gäller.

Feliĉo hodiaŭ karesas, morgaŭ forgesas.

[PROVERBO EL LA PROVERBARO DE L L ZAMENHOF, KOMPOSITA PER LA LITERTIPO OMNIBUS]



OMNIBUS: Produktado de libroj, gazetoj kaj reklamiloj en esperanto, sveda kaj aliaj lingvoj; ankaŭ cirilaj literoj. Pli ol tri mil malsamaj litertipoj je dispono.

Omnibus · Box 135 · 135 23 Tyresö · Tel. 08-742 83 36 · Fakso 08-712 39 93